

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA. ★

N-o 36, 12. Junio 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

Ĝis nun jam 1700 Kongresanoj por Praha el Australio, Azio, Ameriko, Afriko kaj Europo.

Laŭ komuniko de la ĝenerala sekretario de la XIII-a (s-o Aug. Pitlik, ĉefkomisario ĉe la Komerca Ministerio, Praha III, Nerudova 40) ĝis la 8-a de junio aliĝis 1700 (mil septcent) kongresanoj el ĉiuj partoj de la mondo: el Aŭstralio, Azio, Ameriko, Afriko kaj Eŭropo.

Samtempe ni povas sciigi, ke laŭ decido de ĉsl. Ministerio por Eksteraj Aferoj de 22. V. 1921 (n-o 7155/21 fin) la kongresanoj ricevos pasport-rabaton de 50%, kaj laŭ decido de ĉsl. Fervoja Ministerio de 25. V. 1921 (n-o 28079/III/3) ili havos rabaton de 50% sur la ĉeĥoslovakaj fervojoj. Speciala fervoj-legitimacio estos sendata al la pagintoj de la kongres-kotizaĵo.

La ĉsl. Ministerio por Eksteraj Aferoj estas petita de la Loka Kongresa Komitato inviti eksterlandajn registarojn.

La aliĝiloj kaj kongreskartoj estas ĵus sendataj al la kongresanoj.

Komercaj Ĉambroj k. Esperanto.

Laŭ la sciigoj ricevitaj de la centra oficejo aliĝis al la decido de la Pariza komerca ĉambro la francaj komercaj ĉambroj de Grenoble, Calais, St. Omer, Moulin kaj Mâcon.

GRENOBLE estas ĉefurbo de la departemento Isère, 80 000 loĝantoj. Grava turisma centro de francaj Alpoj (bonvolu demandi gvidlibron en Esperanto al la „Syndicat d'Initiative“, oficejo por fremduloj), centro de metalurgio, kemia fabriko kaj ganiproduktado. La utiligado de akvo-falaj fortoj en la Alpoj permesas al la elektraj stacioj liveri la elektran forton al la industrio de Lyon kaj St. Etienne.

CALAIS estas ĉefurbo de departemento Pas-de-Calais, 75 000 loĝantoj. Mara haveno kaj punto-fabrikado.

ST. OMER estas distrikta urbo de la sama departemento, 22 000 loĝantoj, lanfabrikado kaj cerealoj.

MOULIN estas ĉefurbo de la departemento Allier, 22 000 loĝantoj, ĉapel-kaj vinagrofabrikado, lignajlaborejoj.

Ĝis kiam ankoraŭ?

Alvoko de Pola Esperantista Societo al la Esperantistaro.

Ĝis kiam ankoraŭ vi pacience kongresados, samideanoj? Ĝis kiam ankoraŭ vi entuziasme himnos pri la nerealiĝanta espero, pri la deviga instruado de Esperanto en la lernejoj?

Ĉu al vi ankoraŭ ne sufiĉas la dekadu esperantaj kongresoj, la pli ol kvarcentjara propaganda periodo, la ĉiutloke sur nia globo starigitaj esperantistaj postenoj, la ĝis enuo senĉesa propagando de la samideanaro, la preskaŭ ĉiujara kongresado de ĉiuj fidelaj entuziasmuloj? Ĉu vi ne vidas, ke viaj penadoj, via programo estas jam sufiĉe popularigita en la neesperanta mondo, kvankam la propagandajn argumentojn sekvas ĉiam la bone antaŭvidataj kontraŭargumentoj de la neesperantistaro?

Ni alvokas al nova taktiko: ne tiom sendirekte propagandi Esperanton, sed postuli konkrete, ke ĝi estu enkondukata devige en la ĝeneralan lernej-programon. Diros eble iu: ne nova ideo! oni tion faris sed senefike. Tamen la lasta periodo montris, ke io ŝanĝiĝis en homaj spiritoj. Sed tio estas malmulta.

Oni opinias, ke sufiĉas varbi la parlamentajn delegitojn por nia ideo, por ke la decido pri deviga enkonduko de Esperanto en la lernejojn, unufoje prezentita al la parlamento, estu akceptata per la delegitaro. Ho! kiel naiva iluzio! Oni supozis, ke la delegito ne estas influata per la opinio de siaj elektantoj kaj pensis, ke se la delegito eĉ decidus ion kontraŭ la volo de ili, oni tion ne povus iamaniere nuligi. Tiu vojo ne gvidas al celo en la konstitucia ŝtato.

MACON estas ĉefurbo de la departemento Saône-et-Loire, 18 000 loĝantoj, vinkomerco.

Komercestoj dezirantaj sciigojn pri tiuj ĉi urboj, bonvolu skribi al la k. ĉ. (Chambre de Commerce) en Esperanto.

Esperanto en Lernejoj.

Ĉeĥoslovaka ministerio de instruado en principo permesas en la lerneja jaro 1921/22 laŭvolan instruadon de Esperanto en la duagrada lernejoj.

La landa lerneja konsilantaro en Praha dissendis al la direktoroj de ĉiuj duagrada (gimnaziaj kaj realaj) lernejoj la jenan cirkuleron, kiu havas n-on I-B 718—31171 ai 21 kaj daton 14. IV. 1921:

La ministerio de instruado kaj nacia klero sciigis nin per dekreto el 27. marto 1921 n-o 5545-21, ke ĝi volonte en la lernejoj 1921/22 tie, kie por instruado de Esperanto estos fatigaj kondiĉoj personaj kaj aferaj, permesados instruadon de tiu ĉi fako kiel fako laŭvola en ŝtataj duagrada lernejoj.

Al la direkto de lernejo oni ordonas, ke ĝis fino de la lernejaroj 1920/21 en okazo, ke anonciĝos laŭleĝa nombro de partoprenantoj por la venonta lernejarro, ĝi sendu al ni proponon enkonduki tiun ĉi fakon kune kun instruplano, kaj ke ĝi sciigu, kiamaniere la proponita instruado akiris kapablecon por tiu ĉi instruado.

Vicprezidanto
de la landa lerneja konsilantaro:
D-ro Metelka, pm.

* * *

Informante pri tiu ĉi vidpunkto de nia ministerio, ni petas publikigi ĝin. Ni ne forgesos informi sisteme, en kiom da lernejoj ni sukcesis vekti la intereson de la lernantoj kaj de la profesoroj. Neĉese estos nun, ke ĉiuj samideanoj, kiuj estas kapablaj instrui — ankaŭ tiuj, kiuj jam ricevis

Por enkonduki Esperanton en ĝeneralan mondan uzadon, estas neĉese, ke ĝi estu enkondukata en ĉiuj landoj, sekve per ĉiuj parlamentoj, aŭ almenaŭ per plimulto da ili. Efektive, se ni supozas, ke en iu parlamento troviĝus sufiĉa kvanto da delegitoj favoraj por nia ideo, tiam Esperanto enkondukita en tiu ĉi lando estus sen granda signifo por la landanoj, ĉar en aliaj landoj ĝi estus konata nur de la malgrandaj ĝisnunaj grupetoj.

Ni proponas fial samtempe demandi enketi ĉiujn parlamentojn: „Ĉu la parlamento akceptus Esperanton, eltrovitan de d-ro L. Zamenhof kiel oficiale internacian helpan lingvon, kaj enmetus ĝin en la programon de la lernejoj en la lando, se samtempe ĉiuj aliaj parlamentoj aŭ almenaŭ la plej gravaj same farus?“

Tiamaniere formulinte la demandon ni sukcesos, ke la parlamento de la lando A, B, C, ktp. akceptinte tiun proponon, estos devigata al nenio, se aliaj parlamentoj la proponon ne akceptos; kontraŭe, se aliaj parlamentoj ĝin akceptos, estos jam la bazo por la konkreta postulo, ke Esperanto estu enkondukata en la lernejojn de la lando.

Por tiu enketa laboro neĉese estas komisiono, kiu ĝin organizus. Ĝi estos kreota kaj sankciota de la kongresa esperantistaro.

Tiu propono, iom alie redaktita, estis sendita por Haga Kongreso. Ni proponis, ke pri la enketo zorgu Ligo de Nacioj; sed tiu vojo montrigis malbona, unue ĉar — kiel ĝuste oni rimarkis — la Ligo havas nuntempe tro multe da aferoj por pripensado, due ĉar ordinare pri la infano zorgas plej bone ĝiaj propraj gepatroj, ne la fremdaj personoj, trie ĉar la diskutado pri la deziresprimo tiel pala kaj al nenio deviganta, kiel tiu, kiun oni prezentis, (vidu ĝeneva „Esperanto“ n-o 245, januaro 1921) en kiu oni nur petis sekvi kun inte-

ateston pri tio de la ekzamena komisiono de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio — igu sin ekzameni ĉe la ŝtata komisiono, en kiu la komisario por Esperanto estas s-o Josef Eiselt, gimnazia eksdirektoro en Praha, kaj prof. V. Krouzil en Brno por ĉeĥaj lernejoj.

Por Ĉeĥoslovaka Esp. Asocio:
Rud. Hromada,
ĝen. sekretario,
Praha VII-355.

Deka Nacia Kongreso de Belgaj Esperantistoj en Liège.

(Laŭ afabia raporto de ĉeestinto.)

Jam sabaton la 14-an de majo s-oj Derigat, sekretario, kaj Sibille, kasisto de la „Liège'a Ago“, malfermis la akceptejon konvene starigitan en la Hotelo de l'Univers, antaŭ la stacidomo Guillemins. La akceptejo estas anoncata de granda afiskalikoto fiksita sur la balkono, je la unua etaĝo. Oni tre bone vidas ĝin elirante la stacidomon, kaj ĝi faras sendube bonan efikon, ĉar multaj fremduloj haltas legante ĝin kun granda atento. Speciale la steloj rimarkigias, kaj ni gratulu pri tio nian pentriston-samideanon V. Ture el Liège, kiu pentris la afison artistmaniere.

Je la tria alvenas kelkaj Verviers'anoj kaj poste s-o Cogen, vicprezidanto de la Belga Ligo, kiu anstataŭas s-on Witteryck, malsanan.

De la kvara ĝis la deka vespere eniras senhalte laŭ la alveno de l' vagonaroj la geparoprenontoj, kiuj deziras elpreni siajn kongreskartojn aŭ informiĝi pri la loĝejoj rezervigitaj.

Inter ili oni rimarkas s-on Pétiau, sekretario de la Belga Ligo, kaj s-on Schoofs, redaktoron de „Belga Esperantisto“. Cirklaŭ la oka eniras la prezidanto de la organizinta komitato, s-o komandanto Raulier, la komitato kaj la membraro de „Liège'a Ago“. Estas tamen dirinde, ke multaj el tiuj anoj alvenis postgagmeze kaj helpis sindoneme laŭ la bezonoj.

reso la movadon kaj „rekomendi la preparon de raporto“ donas, eĉ favore jesita, efektive nenion seriozan, kaj malgraŭ tio — ne estis akceptata. Do niaj infanoj estu edukataj de iliaj propraj gepatroj!

La diskutado en Hago pri la propono de Pola Esperantista Societo estis prokrastita preskaŭ ĝis la lasta momento. Oni ne komprenis ĝian gravecon kaj diskutis pri ĉio, krom la projekto mem. Traleginte la raporton pri tiu ĉi diskutado ni konstatis, ke ni faris eraron ne parante antaŭe sufiĉe la gazetaron. Pro la tiama bolŝevika invado en Polon kaj pro malfavoraj valutaj cirkonstancoj ni ne povis eĉ revii pri la sendo de propra delegito, kiu subtenus la proponon persone. Nun, sendante denove la projekton, iom ŝanĝitan, ni samtempe petas la esperantistan gazetaron, kiel eble plenehave ripeti tiun gravan alvokon, por ke la esperantistaro, venante al la kongreso, komprenu la gravecon de la diskutata propono.

Propono de Pola Esperantista Societo
al la XIII-a Universala Kongreso
de Esperanto en Praha.

Pola Esperantista Societo, konsiderinte ke nia ĉefa tasko celo en la realigo de nia programo estas inklini la ŝtatojn enkonduki Esperanton en la lernejojn, kiel devigan lingvon, petas XIII-an Universalan Kongreson de Esperanto en Praha, ke ĝi elektu komisionon, kiu sin turnos al ministerioj de la publika instruado en ĉiuj konstituciaj parlamentaj ŝtatoj, proponante, ke ĉiu el ili promesu eventuale enkonduki Esperanton, kreitan de d-ro Zamenhof, en la programon de la lernejoj de sia lando, kiel oficiale internacian, helpan lingvon, se samtempe ĉiuj aliaj, aŭ almenaŭ la plej gravaj el ili, ankaŭ konsentos fari la samon. La komisiono finos sian taskon post la publikigo de la rezultatoj de tiu ĉi enketo.

Malfruiĝo de la hodiaŭa numero

okazis, ĉar la en lasta semajno muntita presmaŝino ne tuj funkcias. De n-ro 38 ni povas denove garantii precizan aperadon. Se eble, ni ekspedos la ĵurnalon en estonteco eĉ unu tagon pli frue ol ĝis nun. Ni petas al niaj legantoj senkulpigon pro la neevitebla malfruiĝo.

Je la deka ĉiuj, kiuj avertis pri sia veno sabaton, estas kunfintaj en kafejo, kie rimarkigas sur la bela stela kongreskarto videbla sur la brusto de ĉiu.

S-ino Sibille, helpkasinisto, ne perdis unu minuton tiuvespere. Ĝis la deka horo naŭdek partoprenantoj estis alvenintaj.

Baldaŭ la gesamideanoj, lacaj post tiel longaj veturadoj (ĵuj alvenis el Bruĝo, Gento, Antverpeno, Anglujo kaj Nederlando), disiris laŭdirekte al la hoteloj.

Post la foriro de la gekongresanoj la komitato de B. L. E. okazigis malgravan kunparoladon kun la organizintoj por decidi lastmomente pri la okazantoj de la morgaŭa kaj postmorgaŭa tagoj!

Dimanĉon matene, s-o Derigat jam de la oka ĉeestis la akcepteojn, atendante siajn kunlaborantojn. S-o Cogen alvenas unua kiel ĉiu bona prezidanto; poste alia, pli malfrue ankoraŭ alia, kaj fine la enirado ne ĉesas.

Vere kun ĝojego oni admiras la gesamideanaron, klopodantajn — pro la granda nombro — por trafi la oficialan tablon, kie ges-oj Sibille ne havas momenton por turni la kapon. Preskaŭ la tuta belga esperantistaro estas tie. Neniu volis resti hejme, kiam la geamikoj laboris por la propagando.

Sed baldaŭ la deka horo alproksimiĝas. La amikoj serĉas unu la alian por esti kune dum la urbotrairo.

Antaŭ la pordo muzikistaro ludas gajaĵajn melodiojn, marŝmuzikaĵojn. Unu signalo: „Ĉu oni estas preta? ... Antaŭen!“ La sekvantaro ekmarŝas, verdaj flagoj flirtas sub la zefiro. Vere, ili estas du cent.

Trairante la centrajn bulvarojn, la sekvantaro irafas la mezon de la urbo. Tamen, pro la frua horo ne multaj promenantoj vidiĝas; kelkaj komercistoj eliras siajn vendejojn por rigardi la esperantan karavanan.

Kaj tiel oni atingas la Universitaton, kie okazos la ĝenerala ĵara kunsido de Belgia Ligo.

S-o Cogen malfermas la kunvenon per bela parolado. Li citas la lastajn sukcesojn de Esperanto, laŭdas la organizintojn pro la bona aranĝo de la programo kaj esperas, ke la fina rezultato rekompencos ilin per iliaj klopodoj.

F-ino Jennen, anstataŭante la kassiston malhelpatan, parolas pri la pasajoj kaj konkludas legante la bilancon.

S-oj Schoofs kaj Pirnay paroladas pri diversaj ĉefajtoj. La kunveno fermiĝas je kvarono post la dekada, kaj la tempo proksimiĝas por la akcepto en la urbodomo.

Dum la daŭro de la kunveno s-oj Sibille kaj Derigat atendis en la stadidomo la anglajn knabojn de Romilly Boy's Choir el Barry, gvidataj de sia direktoro, s-o Evans, kiuj estas partoprenantoj la kongreson. Ĝuste je la alveno de la infanoj, la grizaj nebuloj, kiuj pendis sub la ĉielo dum la mateno, subite ekkrevis, kaj la pluvo falis forte. Tramveturilo oni devis atingi la Urdomon, kie oni alvenis samtempe kun la aliaj samideanoj.

Kion diri pri la akcepto, se ne, ke ĝi estis vere kora flanko de la skabenaro kaj kontentiga nianflanke!

Du paroladoj fariĝis, unu de la anstataŭanto de la urbestro kaj alia de la prezidanto de la kongreso. La skabeno deziris al ni bonvenon en la malnova urbodomo kaj gratulis nin pri la homara celo, kiun ni provas trafi. S-o Cogen respondis per dankaj paroloj kaj citis denove la helpon de UEA al la familioj de la militistoj.

Poste ĉampanvino kaj cigaroj estis disdonataj inter la akceptatoj, kaj ni forlasis la dandinkan skabenaron ne forgesante paroli kun ĝi pri niaj antaŭvidajtoj pri Esperanto en Liège.

Fine, la kongresano fotografiĝis antaŭ la Universitato.

Je la dua, festeno kunigis nin denove en Hotelo Trianon. Jen detaloj pri la manĝokarto:

Zamenhof-Supo
Soleaĵo-Trianon
Stange rosita lumbaĵo
Frumaturaj legomoj
Graskokino farĉita per sinko
Laktukalato
Esperanto-pudingo
Vino St. Etienne.

Oni ne povas sufiĉe laŭdi la kuirrestron de „Trianon“ pro lia arto. Prave, li faris kiel eble plej bone, kaj la esperantistaj stomakoj longtempe memoros pri tiuj bonaĵoj.

Kvin reprezentantoj de la gazetaro ĉeestis la festeno.

S-o Cogen levis sian pokalon kaj trinkis je la sano de la gereĝa familio; samtempe telegramo estis forsendata. Aliaj toaŝtoj sekvis, unu de s-o Petiau al la ĵurnalistoj, el kiuj unu respondis. Alia de f-ino Jennen al la organizintoj, s-o Sibille respondis, ktp.

La festeno finiĝis je duono post la kvara per mallonga dancado kaj kanto de la „Espero“.

Vespere je la oka okazis en la beleta teatro „Legia“ granda esp. festo. Estis prezentata teatraĵo de valona verkisto „Je cent-unu-jara“ (A cint e in'ans), tradukita Esperanten de la Verviers-a grupo. La Spa'anoj interpretis ĝin; kaj estas dirinde, ke la aktoroj estis forte spaidataj, precipe s-o Borckmans, kiu en rolo de maljuna patro ridigis multfoje la aŭskultantaron per siaj vizaĝmimoj; same s-o Desonay en rolo de senspirita laboristo, lia timo pri la voŝta (?) stelo estas tute senartifika. Kaj ĉiuj aliaj, kiujn ni bedaŭrinde ne povas citi pro manko de loko.

La muzika parto estis la afero de la Romilly Boy's Choir. Ĝi vere mirigis nin ne nur per la ĝusteco de la kantado, sed ankaŭ per la belega kuneco de la voĉoj. La juna violonistaro, kiu ĉarmis nin per diversaj arioj, skotaj kaj kimraj, estas ankaŭ laŭdata. Ni ne forgesu ankaŭ gratuli la ĝentilan Spa'an pianiston. Unuvorte: bela vesperfero, dum kiu regadis la plej fidema amikeco inter la gesamideanoj.

London. Ĝia Moŝto la Suno konsentis, ne tro malfrue, lomete partopreni la ekskursojn. Tra la krutaj vojoj de l' rivero Ourthe, kies mirindajtoj estas famaj, la unua esperantista karavano, junuloj kaj maljunuloj, gvidataj de s-o Sibille, atingis la „Roche aux Faucons“ (Falkroko) kaj sufiĉe admiris la imponan silenton de la ombroprenaj arbaroj kaj krutajn vidpunktojn de la Liege'a regiono.

Je la kvara, ĉiuj revenis piede al Tilff, kampa restadejo, kaj atendis la aliajn ekskursantojn, kiuj (inter ili la angla lernejar) estis gviditaj de s-o Derigat. Tiuj ĉi alvenis je duono post la kvara. La Romilly-knaboj supreniris la kioskon kaj kantis antaŭ la publiko. Monhelpon ricevis de la urbo Tilff la organizinta komitato. La Tilff'anoj multe aplaudis la infanojn kaj konsentis pri ilia kantarto. Sed la horo de la foriro alproksimiĝis. La manoj estis premataj, la reciprokaj gratuloj dankoj kunigis lastafoje la kongresanojn, kaj la vagonaro forportis ilin, ĝis la dekunua kongreso.

Mardon la ĵurnaloj presis elokventajn resumojn. Fine, bona sukceso por Esperanto!

UEA-Kunveno dum la Germ. Esp. Kongreso en Essen

(14.—17. V. 1921).

La ege ampleksa programo de la kongreso bedaŭrinde malebligis la aranĝon de la projekta oficiala kunveno de UEA-anoj. Pro tio la 17-an de majo nur okazis „parolado“ inter la ĉeestantaj membroj kaj delegitoj de UEA, proksimume 20 personoj, kiuj prezidis s-o Rob. Kreuz, Frankfurt a. M.

Atentigante pri la grandega signifo de UEA por nia internacia movado kaj ĉefe por la necesaj internaciaj rilatoj li detale pristribis la malfacilaĵojn, kontraŭ kiuj devas batali la Centra Oficejo. En elokventa maniero li petis, ke ĉiuj membroj kaj delegitoj kunhelpu plifaciligi la trafikon. Oni ne troŝarĝu la oficejon, oni faru seriozajn servojn, ĉar sole per tiaj nia afero povas progresi. Sole la praktika uzo de Esperanto kondukos al la celo.

Por plifortigi la laboron de UEA en la diversaj teritorioj la najbaraj membroj kaj delegitoj kunvenu de tempo al tempo kaj faru reciproke proponojn, servojn, propagadon. Oni devus tamen en ĉiu kazo eviti fari fanfaronan reklamon, kiu pli malhelpus ol ĝi helpus, oni devus kontraŭbatali al sensencaĵoj de fantaziuloj, kiuj per sola ago detruus tion, kion serioze laboranta persono kun multa peno estis atinginta.

La ĉeestantoj esprimis la jenajn dezirojn:

1. La komisiono bonvolu zorgigi, ke la Centra Oficejo de UEA funkcii pli rapide kaj ke ĉiuj aferoj estu pli individuaj plenumataj.

(Ĝenerala deziresprimo de ĉiuj ĉeestantoj).

2. En la lasta larlibro de UEA oni bedaŭrinde maltrovis la antaŭ la milito ekzistinta landkartoj. Ĝi ĉiam trege helpis klare kaj impresive demonstracii la disvastiĝon de UEA ne sole en Germanujo kaj en Eŭropo, sed eĉ en la tuta mondo. La komisiono bonvolu konsideri la utilon kaj ree eldonigi tian karton por la tuta mondo.

(Decido laŭ propono de s-o prokuratoro Reinking el Braunschweig.)

3. UEA bonvolu kiel eble plej severe malhelpi al kolektantoj trouzantaj la servojn de delegitoj, tuj ĉesi la enpreson de pliaj reklamoj, se alvenos plendoj, ke la anoncinto ne respondis. Tio estu eĉ farata, se la pago jam okazis.

(Decido laŭ propono de s-o sekretario Ranft de GEA.)

4. La ĉeestantaj membroj promesas al la komisiono post klariga parolado de s-o Kreuz pri la malfacilaj cirkonstancoj de UEA, laŭ ĉiuj fortoj ĝin subteni en praktika maniero, eviti troŝarĝon de la C. O., propagandi ĝin ĉie, aliflanke postulan, ke la agado estu ankaŭ konsidere taksata. Nur administracian pritrakton oni malaprobas.

(Decido laŭ ĝenerala deziresprimo kaj propono speciala de s-o Kreuz.)

Estas salutinde, ke okazis tia preparola kunveno. Esperable dum la venonta kongreso okazos laŭplane aranĝota oficiala kunveno. Ni povas substrecki la diritan kaj ege rekomendi al ĉiuj esperantistoj aliĝi al tiuj grava asocio, kiu malgraŭ multaj malfacilaĵoj sukcesis evitigi flakon kaj reprezentas la sole taŭgan internacian organizaĵon esperantistan.

Kotizo por germanaj membroj-abonantoj mk. 40.—, pagebila al loka delegito de UEA, al s-o R. Kreuz, Frankfurt a. M., poŝta ĉekokonto 468 15, aŭ senpere al la Centra Oficejo de UEA, 12. Bd. du Théâtre, Genève.

Afranku laŭtarife!

En lasta tempo la administracio de ET devis tre ofte pagi punon por ne sufiĉe afrankitaj leteroj kaj poŝtkartoj el Bjalystok, Bydgoszcz-Bromberg, Siedlce, Warszawa, Berlin, Brno, Tallinn ktp. La punpago estis parte sufiĉe alta, ekzemple por letero de s-ro J. W. el Tallinn ni pagis 1,60 mk. Ni do petas ĉiujn niajn korespondantojn, ke ili pli diligente prientnu la plej novan poŝtan tarifon de sia lando; ĉar estas ne agrable pagi punon por afero, pri kiu oni ne estas kulpa kaj kiu estas evitebla.

Esperanto en Polio.

(Raporto de Pola Esp. Servo.)

BYDGOSZCZ. ET daŭre elmetita por publika uzado en la legejo de Urba Biblioteko, kaj elpendigita en diversaj urbaj kioskoj. La biblioteka direktoro tre favoras Esperanton kaj je tia bona okazo oni petas la redakciojn kaj eldonistojn alsendigi iliajn gazetojn kaj verkojn, kiuj pliricigos la tute aparte starigintan Esp. Fakon. Adreso: Miejska Biblioteka, Bydgoszcz, Polio, Stary Rynek. — Fondo de propagando-komitato al kiu apartenas s-o prof. Kronenberg, s-oj Feitke kaj Pregel.

LODZ. Vigla laboro de la propagando-komitato, kiu presigas propagandilojn, afiŝojn, ktp. kaj elpendigas ilin je ĉiu ajn ebla loko. S-o Lejzerowicz perolis pri „Esperanto kaj naciismo“. — ET estas vendata en kioskoj, sed ankaŭ de la stratgazetistoj.

OLKUSZ. Malfermo de filio de Warszawa „Pola Esp. Societo“ kun 37 ano, inter kiuj troviĝas tre gravaj personoj kiel Starosto, gimnazia direktoro, policestro k. a. — Senlace propagandas s-o Witkowski.

POZNAN. La ĉi tiea Komerca Lernejo de s-o d-ro Grosstuck akceptis Esperanton kiel konstantan lernfakon. La Instituto vizitas 200 lernantojn. — Okazas du kursoj: pollingve gvidata de s-o Borkowski, del. de UEA kaj germanlingve de s-o Kalitzke. La 9-an de majo okazis konstitucia kunveno de la fondota unuigo. Provizore oni fiksis komitaton, konsistantan el 7 personoj. Interalie apartenas al la komitato konata pola grafino s-ino Mycielska. „Posener Neueste Nachrichten“ pli kaj pli favoras nian movadon raportante regule en siaj esp. anguloj pri sciindaj esp. novaĵoj.

SIEDLCE. Tri esp. kursoj okazas: du elementaj kaj unu konversacia, same por 72 personoj. Gvidanto s-o Cz. Pruski, del. UEA. Aperis 4-a numero de rondira gazeto „La Radio“. — ET estas vendata en centrubra librejo.

TUREK. Fervora propagando de kelkaj samideanoj. En plej proksima tempo okazos publika propagandparolado, farota de s-ano Kronenberg.

WARSZAWA. Preskaŭ ĉiuj ĉi tieaj gazetoj raportis pri la konferenco okazinta la 21-an de aprilo pri temo: Scienco kaj lingvo internacia Esperanto. Nur „Rzeczpospolita“ apertis mokeman artikolon. „Kurier Warszawski“ aperigis pri la konferenco raporton, kiu tre favoras Esperanton. — Oni restarigas la iamajn „Pola Esperanta Societo“.

ZAKOPANE. Enkonduko de Esperanto en ĉi tiea gimnazio kiel nedeviga lernobjekto.

KARWINA (Teŝina Silezio). Esp. kurso inter tieaj poloj kun pli ol 20 ano.

Karavano de Polaj Esperantistoj al Praha.

La delegitaro de UEA en Varsovio post multaj penoj sukcesis ricevi de la ĉeĥoslovaka konsulo specialan privilegion kun rabato por la partoprenantoj al la XIII-a:

1. Faciligilo je ricevo de pasporto.
2. Rabato 50% de la viso de pasporto ambaŭflanke.
3. Se kolektiĝos granda anaro al la kongreso, ni ricevos specialan vagonon rekte al Praha; la konsulo ankaŭ promesis rabatiĝi laŭ ebleco la biletkostojn de la kongresanoj, ktp.

Tiacele la delegitaro petas kiel eble plej multnombro partopreni la XIII-an en Praha.

Ĉar ricevo de pasporto estas kunligita kun diversaj malfacilaĵoj, estas konsilinde jam nun klopodi por pasporto. Por visigi la pasportojn de ĉiuj partoprenantoj kaj por profiti de la rabato, la delegitaro petas ĉiujn, sendi la necesajn ne pli malfrue ol ĝis la 10-a de julio. La ferveturo el Varsovio okazos la 27-an de julio 9.50 h. vespere, de Centra Stacidomo.

Adreso: Adolfo Oberrotman, del. UEA, Varsovio, Krak-Przedm. 10.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Kongreso de Francaj Komunistoj por Esperanto.

La kongreso de la franca komunista partio okazinta en Parizo dum la pentekosta voĉodona rezolucio por Esperanto.

Subvencio al Esp. Grupoj.

La urba konsilantaro de Saint-Maur (apud Parizo) decidis doni al la esp. grupo subvencio de 100 fr. Dum ĉi tiu jaro la urbaj konsilantaroj de Le Bourget kaj de Le Cresot donis al la esp. societoj de siaj urboj, la unua 200 kaj la dua 300 fr.

Esperanto kaj Ido.

La 24. majo okazis en Pariza klubo „Le Faubourg“ („La antaŭurbo“) kontraŭdira parolado pri Esperanto kaj Ido. Por Esperanto parolis s-o Camescasse, del. de UEA, kaj Gabory, sekretario de la revoluciema esp. grupo. Por Ido: de Guesnet, Papillon kaj Gaston Moch. La defendo de Esperanto estis bone prezentita, precipe por diro de Papillon pri neebleco presigi supersignitajn literojn en Rusujo, kontraŭ kio Gabory montris al la publiko la ĵus ricevintajn el Rusujo foliojn „Esperanto sur unu folio“ kun supersignoj.

Morto de Samuel Meyer.

En La Rochelle mortis nia tre malnova sameidano Samuel Meyer, membro de L. K., muljara kunlaboranto de „Lingvo Internacia“, tradukinto de verkoj de Molière, prezidanto de la loka grupo kaj de la regiona federacio. Li estis esp. de pli ol 20 jaroj kaj multaj de liaj tradukoj estas presigitaj en „L'Esperantiste“ de De Beaufront.

Internacia Movado por forigi Militon subtenas Esperanton.

La antimilitarista kaj antikapitalista organizaĵo fondita antaŭ nelonge en Anglujo kaj nomita Internacia Movado por forigi Militon jam publikigis eldonon en Esperanto de sia Deklaracio Kontraŭmilita.

Esperantistoj rekognos la propagandan valoron de tiu ĉi deklaracio kaj tiuj, kiuj simpatias kun la celoj de la movado, skribu al F-ino Bearrice C. M. Brown, sek. de No More War International Movement, 23, Bride Lane, London E. C. 4.

La Petololo.

Sur miaj genuoj
Luladis mi lin: —
En miaj okuloj
Ekvidis li sin!

Sovaĝe li kisigis
Okulon al mi: —
Bildeton la propran
Nur kisigis ja li!

Verkis: Jehuda Halevi (Abul Hasan Ali'awi) 1085—1141
laŭ Emil Bernhard, trad. Th. Oster.

Tra la Mondo.

En la danaj havenoj ankramas nuntempe 140 danaj ŝipoj (t. e. 50% de la tunaro de l' dana komerca ŝiparo) pro malvigla negoco.

Dum la aŭtuna foiro en Frankfurt a. M. (25. sept. ĝis 1. okt.) okazos libra foiro en la nove konstruita „Domo Werkbund“.

Ekskurso de finlandaj esperantistoj al Tallinn (Estonio) per speciala ŝipo okazos je la fino de junio. La prezo estos ĉ. 175 fmk. Partoprenos minimume 150 personoj.

Laŭ gazetraportoj decidis la centra konsilantaro de la rusaj korporacioj, subteni la strikon de l' anglaj ministoj per 200000 oraj rubloj.

Profesoro Einstein faris la 9-an de junio en la universitato Manchester antaŭ ĉ. mil personoj sian unuan paroladon en Anglujo pri la relativeca teorio. La publiko kore akceptis lin. Antaŭe li estis honorata per la titolo de honora doktoro de la scienco.

Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldono de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

LETERO EL HUNGARUJO.

Budapest, 1. junio 1921.

Certe oni rememoras, ke dum la regado de Burbonoj en Paris en vivtempo de la princo de Reichstadt, la filo de Napoleono, en la plej multaj teatroj de Paris oni ludis teatraĵojn, en kiuj ludis ĉefrolon Napoleono. La filo tamen mortis juna ne akirinte la tronon, sed lia populareco estis evidenta.

Simile se oni nun rigardas la programon de la budapestaj teatroj, oni vidas, ke la Nacia Teatro ludas „La nigra rajdanto“ (irredenta teatraĵo pri Sudhungario), la Hungara Teatro ludas „Kapitano Silvio“ (irredenta teatraĵo el Transilvanio), la Teatro Renaissance ludas „Se la trumpetito eksonoros“ (irredenta teatraĵo kun filma parto el Nordhungario), en la Fortikaja Teatro oni ludas malgrandajn irredentajn teatraĵojn, en la kabaredoj oni kantas irredentajn kantojn, en la Muzik-Akademio nun estis per granda soleno la premiigo de la plej bona muzikigo de la nova hungara preĝo per la unueca, malnova Hungario, sur la placo de Libereco oni antaŭ nelonge starigis kvar monumentojn „Nordo“, „Sudo“, „Oriento“, „Okcidento“, kiuj signifas la kvar forprenitajn landpartojn de estinta Hungario. La rifugantoj el la forprenitaj landpartoj aranĝas apartajn festojn. Ĉu tio estas la vojo al la Ligo de Popoloj, al la daŭra paco kaj interkompreniĝo? Sed la popolanimo oni ne povas subpremi kaj la sukcesoj de suprenomitaj teatraĵoj montras, ke granda parto de la popolo tiel pensas kaj sentas! —

La 22-an de majo estis sur la granda „Kampo de Sango“ en Budapest landa kunveno de la malgrandbienaj mastroj. Proksimume 100000 homoj kunvenis, al kiuj oni parolis de diversaj estradoj. La kongreson malfermis regnestro Horthy. La estro de la bienmastroj ministro Szabo de Nagyatad deklaris, ke la vilaĝanoj de Hungario volas pace kunlabori kun la ĉefurbo, sed ne lasos ian ajn diktaturan, perfortan regadon. La amasoj de vilaĝanoj marŝis en multaj kolonoj tra la ĉef-strato de la urbo kun muziko. Vespere estis granda festmanĝo.

La 28-an de majo oni festis per granda soleno la 75-an naskiĝtagon kaj 50-an datrevenon de ekiro sur la politikan vivvojon de la plej fama, plej maljuna hungara politikisto grafo Alberto Apponyi, kiu elokvente reprezentis Hungaron dum la pac-intertraktadoj en Paris. Jam la 27-an la Nacia Kunveno ne havis alian pritraktadon, nur

la oficialan saluton de Apponyi, kiu de 40 jaroj estas deputito de urbo Jaszbereny. La 28-an estis solena meso en la granda baziliko de Budapest, poste inter kolono de societaj senditoj (ankaŭ de esperantistoj) kaj lernataro solena iro al la „Reduto“ (Amuza Palaco), kie estis la oficialaj kaj societaj festalotoj. La urbejo estis ornamita per standardoj, milimuzikoj promenis. Vere grandioza estis la festo de la nacio por la plej granda vivanta hungaro.

Hungara Esp. Servo.

Prof. Einstein en Anglujo.

La fama hebreo-germana profesoro Einstein surlandigis hieraŭ en Liverpool de la vaporŝipo Celtic, reveninte Eŭropon post vizito al Usono por cionistaj kaj sciencaj intereso.

La fama sciencisto kaŭzis ekskcion tra Anglujo per sia vizito. Unue pro lia famiĝo kiel aŭtoro de la teorio de relativeco. Due pro la fakto, ke li venas el lando antaŭe malamika. Ĉiuj ĵurnaloj verkis longajn artikolojn pri lia teorio, lia vivo kaj persona aspekto kaj pri lia geneco, reproduktante lian fotografadon de ĉiuj vidpunktoj.

Deputato de la Liverpoola Universitato, konsistanta el d-ro Adams, la vic-kancelieroj kun ĉiuj profesoroj renkontis lin surŝipe kaj veturigis lin al la universitato, kie li inspektis la laboratorion kaj luncis kun la profesoroj. Poste li veturis al Manchester, kies universitato honoris lin per la titolo de d-ro de scienco, — la unua angla urbo, kiu honoras post la milito germanan klerulon per tia distingo.

Estas interese noti, ke la fama profesoro faris prelegon en la germana lingvo antaŭ mil personoj, li parolis 48 minutojn; neniu tradukis la prelegon, kaj kompreneble la malgranda sciigo de la germana lingvo inter la angloj, klare montriĝis sur la vizito de la ĉeestantoj kaj iliaj mienoj. „Preskaŭ ĉiuj estis tre silentaj kaj atentemaj dum la unuaj dek minutoj“, raportas unu ĵurnalo, „sed dum la progreso de la prelego, multaj fiksigis rigardis la plafonon kaj la fenestrojn, aŭ enrigardis de tempo al tempo en siajn librojn pri relativeco.“

„Jen bonega argumento por Esperanto“ rimarkis unu profesoro de scienco al la raportisto de Daily Dispatch.

La ĵurnalo asertas, ke ne pli ol dek procentoj el la aŭdantaro nur iomete komprenis la prelegon pro la fakto, ke ĝi estis donita en germana lingvo, la ceteraj ĉeestantoj komprenis nenion kaj venis nur por honori la profesoron kaj lian genicon.

J. D. A., Liverpool.

Sporto.

Piedpilka Vetludo inter Germanujo kaj Hungarujo.

La 5-an de junio estis piedpilka vetludo inter la elektitaj ludantoj de Germanujo kaj Hungarujo. La hungaroj venkis kontraŭ la germanoj 3:0, kio ne estas miriga, ĉar la hungaraj piedpilkludistoj estas la plej bonaj sur la kontinento apud la danoj kaj ĉeĥoj. La ludjuĝisto estis germano.

Gazetaro.

DOS NAIE LEBEN. Hebraa ĉiutaga en Bialystok. N-o de 26. majo. Raporto pri la Orleansa kongreso. Favoraj raportoj pri la Orleansa kongreso en la tri orleanaj gazetoj: LE REPUBLICAIN, LE JOURNAL DU LOIRET kaj LE PROGRES DU LOIRET.

Artikolo pri Esperanto kaj la Pariza foiro en SVOBODA, ĉiutaga en Brno (Ĉeĥoslovakujo), n-o de 28. majo. NASZ KURJER, ĉiutaga en Varsovio, n-o de 25. majo: „Letero el Vieno“ de Lodza esp. Oscar Berman, kiu raportas pri la progresoj de Esperanto en Vieno: 12 grupoj policianoj, 5 por tramoclistoj, diversaj en socialistaj kaj katolikaj organizoj, por instruistoj ktp. — Vieno estas la urbo elektita de idistoj por sia internacia kongreso.

KÖLNISCHE VOLKSZEITUNG, Köln, 5. junio, 2-a eldono. Organo de la germana centra (katolika) partio, raportas pri nova ekfloro de la esp. movado en Palestino kaj Egiptio. En Jerusalemaĵ gazetoj lingvo-instruistoj sin rekomendas tiel pri Esperanto kiel por aliaj lingvoj. La plej granda egipta tagĵurnalo The Egyptian Gazette en Alexandria lastatempe entuziasme raportis pri Esperanto.

FRÄNKISCHER KURIER, Nürnberg (27. majo vespere) kaj DIE FÜRCHER (aldono al Fränkische Tagespost), n-o 55 kaj 60, enhavas bonegan artikolon pri Esperanto, la unua gazeto pri „Esperanto kaj gepatra lingvo“, la alia pri „Esperanto kaj Laboristaro“.

WESTF. NEUESTE NACHRICHTEN, Bielefeld (Germ.). N-o de 28. majo enhavas tradukon de maja „Letero el Palestino“ el ET.

SÜDDEUTSCHE SONNTAGS-ZEITUNG, Heilbronn (Germ.). N-o 22 de 29. majo enhavas artikolon pri „Esperanto“ de prof. J. Hermann kun aldona rimarko de la redaktoro d-o Schairer, ke oni ne povas dubi pri la praktika uzebleco de Esperanto, sed ke oni ne povas kompari Esperanton kun vivantaj lingvoj, ke estas absurde aranĝi esp. diservojn aŭ traduki naciajn altvaloraĵajn literaturajn (ekz. alĝenio“) en Esperanto.

FRANKFÜRTER MESSEZEITUNG (Foiraĵeto de Frankfurt), 28. majo. Kun priatendita artikolo pri „Komerco kun Ruslando“.

Recenzejo.

LIBROJ.

(Por mencio alsendu unu, por recenzi du ekzemplerojn.) BILDOTABULOJ por la instruado de Esperanto. De Thora Goldschmidt, prilaboritaj de prof. d-o Joh. Dieterle. Dua korekta eldono. Leipzig 1921. Eldonejo Ferdinand Hirsh & Sohn. 26:21 cm. 104 pg. bind. Prezo 15 mk.

LA MIZERO DE LA SCIENCA ESPLORADO EN GERMANUJO. Germanlingva broŝuro (48 pg.) eldonita de Fofroicejo Frankfurt a. M. Prezo 2 mk.

Enhavas 4 referatojn faritajn la 8. okt. 1920 en la Universitato Frankfurt okaze de ekspozicio „La Germana Libro“.

HARROGATE. Kongresa manlibro.

Vidu ET n-on 34, pg. 2, kol. 1.

GAZETOJ.

ESPERANTISTA LABORISTO. Junio.

Adreso: 177, rue de Bagnole, Paris. Nun havas 1150 abonantojn, tamen bezonas pli por povi bone ekzistadi.

INTERNACIA KOMERCA REVUJO. Majo. Adreso: Zürich, Hauptpostfach 6104. Jarabono 7 fr. — Severe faka komercista revuo: ĉiu praktika esperantisto devas ĝin aboni.

ITALA ESPERANTISTO. Majo.

Adreso: Via Rossari 2, Milano. Jarabono 10 lir., eksterlande 15 lir.

KATALUNA ESPERANTISTO. Junio.

Kun aldono: VIII-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

LA ESPERANTISTO. Aprilo-majo.

Adreso: Wien 1, Postamt 34. Kun bonstila enhavo, presita sur bonega papero.

LA PROGRESO. Majo.

Enhavas interalie 4 ilustraĵojn pri Praha. Adreso: Plzen, Ĉeĥoslovakio, Podebradova tr. 6.

LA REVULO ORIENTA. Marto.

Adreso: Tokio, Uŝigome, ŝin-Ogaŭamaĉi III-14. Interesa revuo en japana kaj esp. lingvoj.

THE BRITISH ESPERANTIST. Junio.

Kun raportoj pri la XII-a Kongreso de Britaj Esperantistoj.

BULLETIN IDO-FRANÇAIS. Marto-aprilo kaj majo-junio.

Direktoro L. de Beaufront.

Parolejo.

87.

(Rilatas al 85.)

Kun plezuro mi legis la proteston de s-o Leono Funken kontraŭ la uzo de la esprimo „opa vendado“, ankaŭ al mi la aparta uzo de la sufikso „op“ ŝajnas ne havi sufiĉan sencan kaj ne rekomendinda. La refuto de la red. mi opinias neĝusta kaj malforta. La koncentran vendadon oni kontraŭmetas al la vendado per abonoj. En la lasta okazo oni vendas kaj aĉetas po jara, duonjara aŭ kvaronjara kolekto da numeroj; en la alia po numero. Ĝi estas do vendado po unuopa numero. Estas indiferece, ĉu la aĉetanto aĉetas unu aŭ pli da ekzempleroj de la numero en unu fojo; ĝi estas kaj restas unuopa (numero) vendado. La eraro de la redaktoro devenas el tio, ke li aplikas al la ekzempleroj, kio estas aplikata al la numero. Cetere estas la demando, ĉu oni ne pli bone povus diri konforme al esprimoj de naciaj lingvoj: ponumera vendado.

(H. C. Mees.)

88.

(Rilatas al 85.)

S-o F. plene rajtas eviti mian la uzon de vortoj aŭ esprimoj malplaĉantaj al li, sed li estas malpravaj, pretendante malpermesi al aliaj la uzon de vortoj, kiuj estas Zamenhofaj kaj komune uzataj. Nu OPA estas jam komune kaj ofte uzata vorto, azia de Zamenhof mem, kiu verŝajne ne estus uzinta ĝin, se li ne juĝus ĝin tute komprenebla kaj korekta. Zamenhof ripetis multfoje, ke „ĉiu prefikso aŭ sufikso estas tute memstara vorto“ kaj „povas esti uzata kiel vorto radika“.

(E. G.-M.)

P. S. Alia afero: Al mi ankaŭ ne tre plaĉas la iom „fanfaronema“ nuna titolo; tamen mi opinias, ke s-o Jung devas multe pripensi antaŭ ol ŝanĝi ĝin, ĉar la sperto pravas, ke generale, se oni ion ŝanĝas en afero sukcesanta, la ŝanĝo ofte malprogresigas la sukceson.

89.

(Rilatas al 87.)

Mi ne opinias, ke estas eraro apliki la „opan vendadon“ al la ekzempleroj anstataŭ al la numero. La prezo estas po ekzemplero 1 gmk, 20 sv. cis., 10 hol. cd. ktp., egale ĉu oni aĉetas 1 aŭ pli da ekzempleroj de unu numero, aŭ 1 aŭ pli da ekzempleroj de diversaj numeroj. En la plej multaj kazoj ja la aĉetanto aĉetas po unu ekz. de unu n-o (tio fakte estas unuopa vendado aŭ — se la aĉetanto regule ĉiusemajne aĉetas la novan numeron — ponumera vendado); sed en aliaj kazoj ni ne havas unuopan vendadon (nome, se la aĉetanto aĉetas pli da ekz. de unu numero) nek ponumeran vendadon (nome, se la aĉetanto aĉetas ekzemplerojn de diversaj numeroj aŭ se li ne estas regula aĉetanto). En ĉiuj kazoj la plej trafa esprimo estus poekzemplera vendado. „Opa vendado“ estas do ne tute logika, sed laŭ mia opinio pli logika ol „ponumera vendado“, pli mallonga ol „poekzemplera vendado“ kaj tute komprenebla.

(T. I.)

90.

Duano, kelkiuj, saluto anst. famo.

Se „limimpostejo“ estas tro longa, kaj vojaĝistaj terminoj bezonas esti mallongaj, „duano“ estus bona formo. Iu diris al mi, ke ĝi konsistas el du radikoj, kiuj havas dadon (nome, se la aĉetanto aĉetas pli da ekz. de unu numero) nek ponumeran vendadon (nome, se la aĉetanto aĉetas ekzemplerojn de diversaj numeroj aŭ se li ne estas regula aĉetanto). En ĉiuj kazoj la plej trafa esprimo estus poekzemplera vendado. „Opa vendado“ estas do ne tute logika, sed laŭ mia opinio pli logika ol „ponumera vendado“, pli mallonga ol „poekzemplera vendado“ kaj tute komprenebla.

La formo „kelkiuj“ estas tro stranga al mi, ŝajntante pleonasmio por „iuj“ aŭ „kelkaj“. Mi ne komprenas, kiel ĝi diferencas je ĉi tiuj formoj per signifo.

En n-o 31 de ET, linio 9, de malsupre de lasta paĝo, staras „saluto“, laŭ la kunteksto kredinde „famo“. Ĉe Esperanto, same kiel ĉe aliaj lingvoj, presaj kaj aliaj eraroj estas neeviteblaj, sed ĉe Esperanto estas pli granda risko, ke ili kreas „fantomvortojn“, kiel oni diras angle, t. e. tiaj formoj eĉ eniras kelksinojn kaj lingvojn.

(Ch.-G. St.-M.)

Rim. de Red.: La vorto „saluto“ ne estas malĝusta; sed la stilo de la kunteksto estas iom stranga. „Famo“ ne havas la esprimotan sencan.

91.

Propono pri internacia korespondado.

Ĉiu korespondanto devas skribi plej legeble, preferi per skribmaŝino. La nomo kaj adreso devas esti faritaj per ŝtampilo. Lastatempe mi ricevis tiom da poŝtarkoj kun nelegeblaj nomoj kaj adresoj, ke mi estas certa ke multaj respondoj ne atingis la adresitojn. Mi certigas, ke mi respondis al ĉiuj.

(J. T. Holmes.)

Germanaj Abonantoj,

kiuj pagis ĝis n-o 38 inkluzive, bonvolu aboni nian ĵurnalon de la 1-a de julio ĉe sia poŝto-oficejo. ET estas enregistrita en la 6-a „Nachtrag“ (komplemento) de la poŝta gazellisto. La abonprezo estas 15 mk. por kvarona jaro.

Abonantoj, kies abono finiĝis aŭ finiĝos per pli frua n-o ol 38, bonvolu pagi la mankantan sumeton ĝis n-o 38 al poŝtĉeka konto 70865 Köln (por Teo Jung, Horrm) kaj deposit la 1-a de julio ankaŭ aboni ĉe la poŝto.

Abonantoj, kiuj pagis por pli da numeroj ol ĝis n-o 38, ne abonu ĉe la poŝto; al ili ni rekte sendos la ĵurnalon kiel ĝis nun. Tamen ilin ni petas, aboni ĉe la poŝto deposit la 1-a de oktobro, ĉar per tio ili ŝparas al ni laboron kaj monon.

Angla kaj Esperanta Etimologio

(Angle kaj Esperante).

Verkita de Charles G. Stuart-Menteh.
(Oksforda diplomo kun distingo.)

„Utila lernilo por atentigi la anglan publikon pri multaj Esp. radikoj en ilia lingvo.“

Holanda Pioniro.

„Interesegaj tabeloj.“ Kristana Espero.

Vidu citaĵojn p. 57 de nova Jar-libro B. E. A.

Prezo 10 pencej (= 4 respond-kuponoj) aŭfrankite.
B. E. A., 17, Hart Street, London WC1.

Bizantio

Monata Ilustrita Esperanta Revuo.

Organo de Konstantinopola Esp. Asocio.

Literaturo * Scienco * Belarto
La Vivo en Oriento.

16-32 paĝoj monate.

Artikoloj en esperanta, greka kaj franca lingvoj.

Jara Abono:

Turkujo t. liroj 2.50, Francujo 20 fk., Anglujo angl. lir. 1.—, por ĉiuj aliaj landoj 15 sv. sv. fk. aŭ samvalora nacia mono.

Adreso: d-o A. Stamatidis, direktoro, Konstantinopolo, Sihanĉ Karakol, Impasse Saverio, 55 b.

Glumarkoj de la Postkongreso en Budapest.

Novaj glumarkoj (ses diversaj koloroj!) aperis pri la Budapesta Postkaj Landa Kon-
:: greso. ::
100 ekz. kostas hungar. kr. 25.—
:: Desegnaĵo ::
:: de s-ano ::
Stefano Palczer.

Haveblaj ĉe

Hungara Esp. Servo,
s-o Paŭlo Balkanyi, VI, Hajos utca 15-II-2, Budapest.

Anoncetoj.

(Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj kostas por dufoja presado la saman kiel kvinpaŝojn de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinpaŝoj presado kostas la duoblon.)

LIGO POR PACO INTERNACIA, 4 Princeton Street, London, W. C. 1. — Sendu vi respond-kuponon por sciigo.

ŜANĜO DE ADRESO. Roman Saković, antaŭe en Lodz, nun loĝas en Nowogrodziec, Polio, Sad Okregowy.

DOMETOJN (ingojn) de vivantaj surlandaj kaj endolĉakvaj MOLUSKO (limakoj kaj konkoj) el ĉiuj landoj deziras ricevi (interŝanĝe je ĉiuj el dezirataj objektoj aŭ esperantistoj) zoologoj d-ro R. Wohlstadt, 22, Lübeckertor, Hamburg (Germ.), Mineralogia-Geologia Instituto.

Korespondado kaj Interŝanĝo.

(Dufoja presado kostas la saman kiel tri numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinpaŝoj presado kostas la duoblon.)

F. Cesarini, del. UEA, Potenza (Italio), deziras korespondantojn de ĉiuj landoj por siaj gekursanoj kaj gesamgrupoj.

S-o Max Butin, Godesberg a. Rhein (Germ.), Kronprinzenstr. 55, interŝanĝas poŝtmarkojn kun eksterlandanoj. Mi donas ankaŭ helpmonbiletojn aŭ ilustr. poŝtkartojn kontraŭ poŝtmarkoj; ĉiam respondos.

Richard Schlitz, Plauen i. V., Germ., Antonstr. 51, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustritaj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Tuj kaj certe respondos al ĉiuj.

Kiu sendos el mi 50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same tiom da manĝepaj germ. poŝtmarkoj Carl Kueper, Düsseldorf 3, Germ., Graf Adolstr. 11.

S-o Anton Skopiniski, Düsseldorf, Germ., Ellerstr. 159, deziras korespondi kun s-anoj en la tuta mondo.

S-o Leono Funken, Florinsmerkt 7a, 1-a etg., Koblenz, Germ., kolektas kaj deziras interŝanĝi germanajn helpmonbiletojn. — Li kolektas ankaŭ vidojn de allandaj famaj arimumentoj (pm. bl.) kaj sendos por ĉiu tia belan vidojn de sia hejmurbo. Li certe respondos.

Prof. Sauerborn, Köln, Siebengebirgs-Allee 52, deziras interŝanĝi stampitajn kaj nestampitajn poŝtmarkojn kontraŭ samnombraj germanaj poŝtmarkoj kun samideanoj en ĉiuj landoj.

Korespondado per poŝtkartoj ilustr. aŭ leroj kun gesamideanoj el ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj, deziras s-ro Ludwig Goppel, Horrem, Bez. Köln (Germ.), Ludendorffstr. 35. Certe respondos.

Korespondado per poŝtkartoj ilustr. aŭ leroj kun gesamideanoj el ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj, deziras s-ro Michael Wieland, Horrem, Bez. Köln (Germ.), Waldweg 21. Certe respondos.

Izak Szpiro, Zoppot apud Danzig, poste restante, deziras korespondi kun germanoj, ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn, papermonojn kaj monbiletojn.

Centrifugaj Pumpiloj

Vapor-Turbinaj, Vapor-Kaldronaj,
Vapor-Maŝinaj, Tubo-Kondukilaroj,
Levilaj, Transportiloj,
Maŝinoj por Sukerfabrikejoj,
Reservejoj,
Movigilaro, Fandaĵo, Kradostangoj

estas fabrikataj de

Fratoj Stork & K-io Hengelo (O), Nederlando.

Fabriko kun pli ol 2000 laboristoj.
Esperanto korespondanta.

Nur petoj de seriozaj firmoj estas konsiderataj.

Internacia organizacio de fabrikantoj kaj komercantoj

Agrikulturaj Maŝinoj

estas fondata! La interesuloj kunvenos dum la XIII-a Kongreso.

Informojn donas

Fr. Barth,

ĉe firmo „Agraria“ en Bratislava, Ĉeĥoslovakio.

KOMERCISTA ESPERANTO-GRUPO

Freiburg i. Br., Katharinenstr. 14

peras ĉiuspacajn negocojn. — Rilatoj al gravaj germanaj firmoj. Perado senkoste.

Luzo niajn servojn!

ARGENTINIO.

bonege dum 7 jaroj kun la fiaj ekonomiaj tie reveturos Argentinio, trapasante okcident-kaj nordokcident-eŭropajn landojn. Absolutaj moralaj-materiaj garantioj. Adreso ĝis la XIII-a: L. Keley, Szászsebes (Sebesul Sasesc), Transilvanio, Rumanio; poste: Keley-Martelli, c. Caseros 528, Buenos-Aires, Argentino.

Interesega Libro Itallingva!

Aĉetu ĉe N. Jäger, Pisa (Italio), Via Vitt. Em. 17, la faman novegan libron

La Historio de Kristo

(La Storia di Cristo)

de l' mondkonata verkisto G. Papini, kies apero tiom impresis la tutmondajn kulturrondojn.

Prezo it. lir. 25.— aŭ sv. fk. 7.— aŭ samvaloron en naciaj monbiletoj.

Al LIEA-anoj kaj al aĉetantoj de almenaŭ 3 ekz. rabaton de 10%.

Ĉe la

Paulusverlag Graz (Austr.)

Karmeliterplatz 5

estas havebla:

Kiel oni fondas kaj organizas Esperantan grupon? de Hanns Sappl, ĉefsekr. de Moka. 28 paĝoj kaj kovrilo. Prezo 1 1/2 Sm laŭ nacia valuto (por Aŭstrujo 10 kronoj, por Germanujo 3 mk., por Svisujo 1 sv. fk.). La prez. de LIEA s-o Stettler skribis: „La broŝuro estas rekomendinda el ĉiuj vidpunktoj.“ Ĉar la unua eldono baldaŭ estas elĉerpita, ni rekomendas baldaŭan aĉeton de tiu utila libreto.

Esperanta Gvidlibro tra Graz. 80 paĝoj. Prezo 1 Sm. Ni rekomendas precipe al la estontaj kongresanoj de la VII-a aĉeton de tiu bele ilustrita gvidlibro.

Esperanta lingva kaj ekzerca libro de dir. Josef Schamaneck (germanlingve). Dua eldono, plibonigita. Prezo 30 austr. kronoj, 6 germ. mk., 1 fk. sv. Enhavas ankaŭ la plej gravajn katolikajn preĝojn aprobitajn.

Plue estas haveblaj lka-sigelmorkoj, leterpapero, koloraj kartoj de la Centra Adm. Oficejo kaj kovertoj kaj ĉia Esperanta literaturo. Prezoj laŭ demando.

Reprezentadon de ĉiuspacaj komercaĵoj, facile vendeblaj en Sudameriko, nur de kapablaj firmoj unuaklasaj, akceptas eksofisticito teknika de la Argentinia Terkultura Ministerio. Konatiĝis ĉirkonstancoj. Post kelkmonata restado ĉi kaj nordokcident-eŭropajn landojn. Absolutaj moralaj-materiaj garantioj. Adreso ĝis la XIII-a: L. Keley, Szászsebes (Sebesul Sasesc), Transilvanio, Rumanio; poste: Keley-Martelli, c. Caseros 528, Buenos-Aires, Argentino.

S-o Robert Winklhöfer, Plauen i. V., Germ., Chamissostr. 22, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj kartojn ilustritajn. Grupestro Leo Fiedler, Schillerstr. 15, III, Breslau 15, Germ., kaj 40 forevorigaj novuloj deziras interŝanĝi kun ĉiuj landoj poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn ktp. Tuj kaj la tutan jaron ĉiam ili respondas.

S-o Weber Herbert, Breslau, Hummerci 25, I, Germ., deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Kurt Bujakowski, Gabitzstr. 166, Breslau 18, Germ., interŝanĝas poŝtmarkojn kaj vidojarkartojn kun ĉiuj eksterlandanoj; ĉiam respondas.

S-o Gerhard Kaiser, Arleiusstr. 28, Breslau 2, Germ., deziras korespondi kun gesamideanoj el Azio, Palestino, Aŭstralio kaj Ameriko; ĉiam respondas.

S-o Franz Levy, Zimmerstr. 4, Breslau 5, Germ., deziras interŝanĝi vigle poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj escepte Anglio, Francio kaj Rusujo; ĉiam respondas.

S-o Berthold Heinrich, Steinstr. 46, prt., Breslau 23, Germ., interŝanĝas vidojarkartojn koloritajn kaj poŝtmarkojn. Tuj kaj ĉiam respondas.

Korespondadi deziras jenaj samideanoj en Omsk (Siberio):

1. d-o Skalski, Bannaja 6.
2. s-o A. Petrov, Sibirvokom. Sibatst upravlenie.
3. s-o B. Najdin, Kuzneĉnaja 13.
4. s-o J. Knaup, Novaja 18.
5. s-ino Toĉikina, Portovaja 40.
6. s-ino Kotovaja, str. Respublika 20.
7. s-ino S. Knaup, Novaja 18.
8. s-o Poljanov, Novaja 18.
9. s-o Ĉeslak E., Bolšaja Lugovaja 111.
10. s-o Gordeev, Novaja 18.
11. s-ino Seĉkareva, Novaja 18.
12. s-o Ĉeslak K., Bolšaja Lugovaja 111.
13. s-o Pletrev, Kuzneĉnaja 18.
14. s-o Kulakov, Novaja 18.
15. s-o Kolĉin A., Barlamovskaja 55.
16. s-o Kernik, Novaja 18.
17. s-o Gerasimov, Novaja 18.
18. s-o Ĉemelev, Novaja 18.
19. s-o Novoselov, Novaja 18.
20. s-o Drozdov, Novaja 18.

Mikaelo Kleverov, librotrenisto, str. de Leono Tolstoj n-o 55, Simbirsko, Rusio, deziras korespondadi kun ĉiulandanoj pri vegetarismo, beleco de naturo, pri vivmoroj de popoloj, geografiaj, serioza propono.

Dimitrij Semenovič Snejko en Gomel, Ruslando, poŝtkesto 42, deziras korespondi.

S-o In. Rukavicina en Irkutsk, Siberio, tre dankas la nekonsatan samideanon, kiu sendadis iln el ET. Plezure li ekscius lian nomon. Li ankaŭ deziras korespondi kun ĉiulandanoj.

S-o Kononovoj Hermann, Teatrajnaja pl. 6-9, Nijnij-Novgorod, Rusio, deziras korespondadi pri ĉiuj demandoj per leteroj kaj poŝtkartoj. Interŝanĝas poŝtmarkojn, esp. kaj naciajn gazetojn.

S-o Constant Faugeras, 15, rue de la Présentation, Parizo, Francujo, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Certe respondas.

S-o A. Smura, Bydgoszcz, Polio, Podolska 20, deziras korespondi kun tutmondaj gesamideanoj per ilustr. poŝtkartoj (bl.) kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, papermonojn; ĉiam respondas.

S-o Jan Bratkowski, Bydgoszcz, Polio, Gdanska 2, u. p. Czerwonka, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bl.), poŝtmarkoj, gazetoj esp. kaj naciaj. Lwow (Polio), str. Sw. Zofii 44, s-o Fr. Zachariasiewicz, liveras 100 malsamajn poŝtmarkojn polajn por sendo de 5 sv. fk., 200 poŝtm. pol. por sendo de 25 sv. fk.; aŭstrajn kaj germanajn kun subskribo Poczta Polska, plebiscit, ruĝa kruco ktp., ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn laŭ katalogo de Michel 1920.

Kiu deziras aĉeti malkare poŝtmarkojn de „Fiume“, Jugoslavio, Litovio kaj Polio, aŭ interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonojn, bonvolu skribi al s-ro L. Galinski, Sobieskiego 5, Białystok, Polio.

Kiu bezonas bonajn polajn poŝtmarkojn kaj papermonojn, tiu povas interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonojn kun mi. Mi korespondas ankaŭ pri matematika kaj naturscienco. — Lazaro Grosberg, Białystok (Pol.), ul. Jurowiecka 5.

Jiri Frankenberg, del. LIEA, Byčička u Ziliny, Slovakio, interŝanĝas poŝtkartojn kaj lerojn kun turistoj de la tuta mondo.

S-o J. Oulehla, adm. oficejo en Skrivany apud Novy Bydzov (Bohemio) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun Rusio, Ukrainio, Polio, Estonio, Litovio, Letonio, Danio, Islando, ĉiujn germanajn plebiscitajn, Württemberg, de ordinara ĝis pli altaj valoroj, po 1 ĝis 10 de ĉiu ŝpeco laŭ katalogo Michel 1920.

H. Haenen, administristo de l' milneriejo, Heerlen (Hol.), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun supersileziaj, rusoj, poloj, ĉeĥoslovakianoj, finnoj kaj ekster-eŭropanoj.

S-o Jozsef Krehnyay, polica inspektoro en Diosgyr-Vasgyar (Hungario), deziras korespondi kun ĉiulandanoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leroj.

S-ano Francisko Balla, Budapest VI, Szondy str. 58, F. 1, intencas komenci korespondadon kun ĉiulandaj laboristoj pri ĉiu ajn temo, per ilustr. poŝtkartoj kaj iom poste per leteroj; certe respondos.

S-ano Georgo Pomian, Budapest IX, Dondar str. 24-II-18, korespondas kun ĉiulandaj laboristoj precipe kun marbord-urbanoj, per ilustr. kartoj kaj leroj; nepre respondos.

S-ano Arono Meszaros, Budapest I, Fehervary ut. 55, F. 1, korespondas kun ĉiulandaj laboristoj pri la vivkondiĉoj kaj pri aliaj temoj, per leteroj kaj ilustr. kartoj; nepre respondos.

S-ano Johano Radiksz, Budapest IX, Boraros ter 5-III-6, korespondas kun ĉiulandaj seriozaj laboristoj nur per leteroj; tuj respondos.

S-ano Stefano Szalay, Budapest VI, Petehozsi str. 31, F. 6, deziras korespondadi kun ĉiulandaj poŝtmark-kolektantoj kaj kun laboristoj per ilustr. kartoj; respondos certe.